

Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Unua raporto pri la agado de la UEA-komisiito pri terminologiaj instancoj

ISO/TC 37 kaj Infoterm

Mélanie Maradan, Berlin (Germanio)



2011

Enkonduke: elekto de komisiito pri terminologiaj instancoj	3
1. Infoterm	4
1.1 Infoterm koncize	4
1.2 Rilatoj al Infoterm	4
1.3 Sugestoj de Infoterm al UEA	5
2. ISO/TC 37	6
2.1 ISO/TC 37 koncize	6
2.2 Membriĝoj en subkomitatoj	7
2.5 Aktiva kunlaboro de UEA ĉe ISO/TC 37	8
3. Utiligo de la rilatoj kun Infoterm kaj ISO/TC 37	9
4. Resume post duonjaro	9
5. Konkretaj proponoj de la komisiito	10
Difinoj	11

ENKONDUKE: ELEKTO DE KOMISIITO PRI TERMINOLOGIAJ INSTANCOJ

Jam antaŭe la Estraro de UEA elektis komisionojn kaj komisiitojn por multaj taskoj kaj laborkampoj. Al ili aldoniĝis en aprilo 2011 komisiito por rilatoj kun la *Internacia Organizaĵo por Normigado* (ISO) kaj la *Internacia informejo por terminologio* (Infoterm). Por tiu tasko oni elektis Mélanie Maradan (Svislando/Germanio).

Oni vidu ankaŭ: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 410, 2011-04-20

<http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=410>

1. INFOTERM


1.1 INFOTERM KONCIZE

La Internacia informejo por terminologio (Infoterm) estis fondita en 1971 de Unesko. Ĝia celo estas subteni kaj kunordigi la internacian kunlaboron en la kampo de la terminologio. En Infoterm membras naciaj, internaciaj kaj regionaj institucioj, organizaĵoj, retoj kaj ankaŭ specialiĝintaj publikaj, duone publikaj aŭ aliaj senprofitaj institucioj agantaj pri terminologio. Nuntempe ili venas de Afriko, la Amerikoj, Azio kaj Eŭropo.

Retejo: www.infoterm.info

1.2 RILATOJ AL INFOTERM

En majo 2011 UEA kaj Infoterm subskribis *Interkonsenton pri kunagado*, kies ĉefaj celoj estas interŝanĝi informojn, subteni unu la alian, kaj kiam utilas kaj fareblas, kunagi por projektoj, renkontiĝoj kaj eldonaĵoj en la kampoj de terminologio, leksikografio, lingvistiko, lingvolernado, administrado de informoj kaj de strukturitaj enhavoj. Infoterm konsentis laŭeble subteni la terminologiajn agadojn de UEA kaj ĉiam helpi al UEA se utilas kaj fareblas.



The screenshot shows the website for the International Information Centre for Terminology (Infoterm). The header features the logo and the name in three languages: English, French, and German. A navigation menu includes links for Home, About Us, Activities, Standardization, Publications, Imprint, and Print. The current page is 'Infoterm Members', as indicated by the breadcrumb trail: 'You are here: HOME » ABOUT US » INFOTERM MEMBERS'. A search bar is located on the left. The main content area is titled 'Infoterm Members' and contains a paragraph explaining that membership consists of Associate Members with full rights and obligations. Below this, there is a section for 'International Members' with a list of ten organizations, each with a link to its website. A sidebar on the left contains a menu for 'ABOUT US' with sub-items: Why Terminology?, Mission Statement, Infoterm Members (highlighted), Special Relations & Affiliates, History of Infoterm, Executive Board, and Infoterm Staff.

Infoterm Members

Infoterm's membership consists of Associate Members who have full rights and obligations. All of them are corporate or institutional bodies, which can be considered authorities in the field of terminology or related fields.

International Members

- [Association for Terminology and Knowledge Transfer \(GTW\)](#)
- [European Association for Terminology \(EAFT\)](#)
- [European Multimedia Forum \(EMF\)](#)
- [International Federation of Translators \(FIT\)](#)
- [International Institute for Terminology Research \(IITF\)](#)
- [International Network for Terminology \(TermNet\)](#)
- [Kamusi Project International \(KPI\)](#)
- [The Terminology Coordination Unit of the European Parliament \(TermCoord\)](#)
- [Universal Esperanto Association \(UEA\)](#)

http://www.infoterm.info/about_us/infoterm_members.php

1.3 SUGESTOJ DE INFOTERM AL UEA

- 1) Infoterm sugestas al UEA traduki la dokumenton “*Guidelines for Terminology Policies*” (Gvidlinioj pri terminologiaj politikoj) al Esperanto. Se UEA tion farus, la dokumento en Esperanto aperus en la retejo de Unesko (samkiel ekz. la angla versio). Temas pri dokumento en la angla ĉirkaŭ 50-paĝa verkita de Infoterm en 2005, kiu pritraktas lingvan kaj terminologian planadojn kaj la preparadon kaj realigadon de terminologiaj politikoj.

Oni vidu la anglan version de la dokumento:

<http://unesdoc.unesco.org/images/0014/001407/140765e.pdf>

- 2) Infoterm rimarkigas al UEA ke la **Eŭropa Patent-Oficejo** (EPO) kaj Google subskribis interkonsenton por maŝintraduki patentajn enhavojn al eŭropaj, slavaj kaj aziaj lingvoj. Infoterm sugestas, se kompetenta esperanta lingvisto disponeblas tiurilate, ke la Esperanto-komunumo provu kontakti Google kaj kunlabori en la projekto.

Oni vidu: <http://www.epo.org/news-issues/news/2011/20110324.html>

- 3) Infoterm memorigas al UEA ke okazos “**Terminology Summer School**” (terminologia trejnado dum la somero) venontsomere en Vieno kaj ke partoprenoj de Esperantistoj estas bonvenaj. Ĝi verŝajne okazos en Julio, sed la ekzaktaj datoj ankoraŭ ne estas konataj.

2. ISO/TC 37

2.1 ISO/TC 37 KONCIZE

ISO/TC 37 - *Terminologio kaj pluaj lingvaj kaj sciaj datumoj*¹ - estas la teknika komitato pri terminologio de la Internacia Organizaĵo por Normigado. Nuntempe la ĝenerala celo estas de tiu teknika komitato atingi tutmondan semantikan kongruecon inter lingvaj datumoj en larĝa senco². Tiuj celoj estas multe pli vastaj ol la originalaj de ISO/TC 37, kiu fondiĝis surbaze de la verko de la interlingvisto Eugen Wüster³.

Por detalaj informoj sur la celoj kaj laboro de ISO/TC 37, oni legu (en la angla): *Business Plan of TC37, Terminology and other language and content resources*, disponebla je http://isotc.iso.org/livelink/livelink/open/tc37_bp.

La teknika komitato eklaboris pri tiom larĝa spektro da taskoj, tiel ke ĝi subdiviĝis en 4 teknikaj subkomitatoj. Teknikaj kaj subteknikaj komitatoj estas organizaj eroj je fako, dum la konkretan laboron faras laborgrupoj, kiuj membras aŭ je komitata nivelo aŭ je subkomitata nivelo.

La 4 subkomitatoj jenas:

ISO/TC37/SC1 - Principoj kaj kunordigado

Agadkampoj: ellaborado de ĝeneralaj principoj rilate al terminologio, lingvaj enhavoj, terminologiaj politikoj, organizado de scioj, konsiderante kaj unulingvajn kaj plurlingvajn kuntekstojn

ISO/TC37/SC2 - Terminografiaj kaj leksikografiaj labormetodoj

Agadkampoj: ellaborado de labormetodoj kaj por terminografio kaj por leksikografio, verkado de proceduroj, kodosistemoj

ISO/TC37/SC3 - Sistemoj por administrado de terminologio, scio kaj enhavo

Agadkampoj: ellaborado de sistemoj por administri terminologion, scion kaj enhavon konsiderante interkongruecon

ISO/TC37/SC4 - Administrado de lingvodatumoj

Agadkampoj: perkomputila administrado de lingvodatumoj

¹ Retejo de la teknika komitato:

http://www.iso.org/iso/standards_development/technical_committees/list_of_iso_technical_committees/iso_technical_committee.htm?commid=48104

² Inkluzive ne nur terminaroj kaj ĝenerallingvaj vortaroj, sed ankaŭ ekzemple ontologioj, kaj malpli ofte uzitaj lingvaj sistemoj kiel gestolingvoj.

³ Dank' al traduko al la rusa de lia disertaĵo, farite de Ernest Drezen, sovetia interlingvisto. Nome, la rusa versio vekis intereson en la sovetia membro de la normiga organizaĵo, tiel ke ĝi proponis krei teknikan komitaton pri terminologio.

2.2 MEMBRIĜOJ EN SUBKOMITATOJ

Ekde 1991 UEA rilatas al ISO/TC 37 je komitata nivelo⁴, kie ne okazas normiga laboro. La labormaniero de teknika komitato povas varii. En la kazo de ISO/TC 37, ne okazas normiga laboro je la nivelo de la komitato, sekve estis bezono por UEA membriĝi je subkomitata nivelo. Tia membriĝo ebligas rekte partopreni la normigan laboron. Tio inkluzivas eblon komenti normigajn produktojn (ekz. ISO-normo dum ties evoluigo aŭ revizio) kaj partopreni rilatajn renkontiĝojn. Tio inkluzivas nek balotadan rajton⁵ nek ricevon de la finaj produktoj (normoj en ties komerca formo). La avantaĝoj por UEA estas aliro al ĉiuj informoj kaj okazaĵoj ene de la teknika komitato, kaj nelaste la videbligo de UEA kaj ties agado inter terminologiaj spertuloj.

Komence de majo la komisiito preparis dosieron por peti membriĝon je la subkomitata nivelo, t.e. en la kvar nunaj subkomitatoj (SC 1, SC 2, SC 3 kaj SC 4). Tiuj kvar subkomitatoj estas preskaŭ sendependaj unuoj. Kvankam ili rilatas fake, ili decidas kaj agadas tute sendepende. Ĉiuj el la kvar teknikaj subkomitatoj akceptis UEA, tiel ke ĝi rilatas nun oficiale kiel organizaĵo kiu aktive partoprenas la normigan laboron.

The screenshot shows the ISO website's 'About ISO' section, specifically the page for 'Organizations in cooperation with ISO' and 'UEA'. The page title is 'UEA' and the subtitle is 'Universala Esperanto-Asocio'. Below the title, there is a section titled 'List of ISO committees in liaison' which contains a table with the following data:

Reference	Title	Type
TC 37	Terminology and other language and content resources	A
TC 37/SC 1	Principles and methods	A
TC 37/SC 2	Terminographical and lexicographical working methods	A
TC 37/SC 3	Systems to manage terminology, knowledge and content	A
TC 37/SC 4	Language resource management	A

Below the table, there is a 'Notes' section with the following text:

Notes

Liaisons A: Organizations that make an effective contribution to the work of the technical committee or subcommittee for questions dealt with by this technical committee or subcommittee.
Liaisons B: Organizations that have indicated a wish to be kept informed of the work of the technical committee or subcommittee.
Liaisons C: Reserved for ISO/IEC JTC1.

http://www.iso.org/iso/about/organizations_in_liaison/organizations_in_liaison_details.htm?id=10045&LiaisonList=True

⁴ Kiel organizaĵo de kategorio A, t. e. organizaĵo kiu aktive kunlaboras.

⁵ Nur la landaj normigaj organizaĵoj balotadas.

2.3 AKTIVA KUNLABORO DE UEA ĈE ISO/TC 37

UEA komentis ISO-dokumenton de la teknika subkomitato SC 2. La 38-paĝa dokumento temis pri tradukado, nome la kvalitokriterioj je tradukadaj procezoj kaj la kvalifikaĵoj de profesiaj laborantoj en tiaj procezoj (ne nur tradukistoj, sed ankaŭ projektistoj, fakaj kontrollegantoj k.s.). La komentojn la komisiito kun faka helpanto⁶ sendis en la angla lingvo⁷. La unua komento estis emfaza atentigo pri la bezono publikigi ISO-dokumentojn en pli ol unu lingvo. La komisiito tiel celis kaj montri ke UEA kapablas fakte kontribui kaj atentigi pri lingvaj problemoj (ekz. unulingva publikigado).

La komisiito de UEA kaj la direktoro de Infoterm partoprenis kune kunvenon de SC 3 en DIN⁸ kiel spertuloj. La kunveno estis labora kaj rilatis al projekto de normo pri *Distributed Ontology Language* (Distribuita ontologia lingvaĵo). La celo de tiu ontologia lingvaĵo estas kongruenco de jam ekzistantaj ontologiaj lingvaĵoj (ekz. *OWL*, *Common Logic*, *RDFS* aŭ *OBO*). La venonta kunsido pri tiu labortemo plejverŝajne okazos komence de la jaro 2012.

⁶ Seán Ó Riain, tradukisto por la Eŭropa Komisiono, Bruselo (Belgio).

⁷ La tri laborlingvoj de ISO estas la rusa, la franca kaj la angla.

⁸ *Deutsches Institut für Normung e.V.*, t.e. la germana normiga organizaĵo.

3. UTILIGO DE LA RILATOJ KUN INFOTERM KAJ ISO/TC 37

La komisiito vidas sekvajn eblojn por utiligi la rilatojn de UEA kun Infoterm kaj ISO/TC 37:

Faka kunlaboro kun la du instancoj

Konkrete: partopreno en kunsidoj, en laborgrupoj, komentado de dokumentoj

Avantaĝoj: videbligo de UEA, monro ke UEA kapablas fakte labori, atentigo pri lingvaj problemoj, disponigo de informoj pri Esperanto

Disponigo de fakaj informoj de la du instancoj al UEA-anoj

Konkrete: Se bezono de fakaj informoj por spertulo⁹, disponigo de normo-enhavo, alikaze ĝenerala simpligo de la enhavo por UEA-anoj. Laŭeble disponigo de informoj en la retejo de Terminologia Esperanto-Centro (TEC).

Avantaĝoj: Interesatoj havas aliron al informoj senpage, ebloj por partopreni konferencojn aŭ/kaj seminariojn.

Vidu ankaŭ la retejon de TEC: <http://esperanto.net/tec>

4. RESUME POST DUONJARO

Unuaflanke, UEA estas asocia membro de Infoterm. Tio ebligas regulajn interŝanĝojn de informoj kaj ideoj, kaj subteno se kaj kiam eblas. Duaflanke, UEA membriĝis en la teknikaj subkomitatoj de ISO/TC 37 kaj tiel fortigis siajn rilatojn al terminologia normigado. Tiel, UEA havas rektan ligon al la normiga laboro kaj obtenis interalie aliron al la enhavoj de normoj rilate al terminologio.

⁹ Ekzemple disponigo de la enhavo de normo pri interŝanĝa formato por terminologio al komputilisto, kiu verkas terminologian datumbankon.

5. KONKRETAJ PROPONOJ DE LA KOMISIITO

1) Partopreno en terminologia trejnado por UEA-anoj

Kio: partopreno en la terminologia trejnado venontsomere en Vieno ("Terminology Summer School") organizota de TermNet (<http://www.termnet.org/>). Temas pri unu-semajna aranĝo taŭga por homoj kiuj ne antaŭstudis terminologion (por pli da detaloj oni legu la programon de la pasintjara aranĝo - http://www.termnet.org/english/events/tss_2011/program.php).

2) Partopreno en la jara renkontiĝo de ISO/TC 37 por UEA-anoj (kaj verŝajne jara ĉefkunveno de Infoterm)

Kio: partopreno en la jara renkontiĝo de ISO/TC 37. Tiu renkontiĝo estas kuniĝo de tutmondaj spertuloj kiuj okupiĝas pri la diversaj temoj de ISO/TC 37. Oni diskutos temojn de nunaj kaj venontaj normprojektoj.

3) Traduko de dokumento kaj ties enretigo en retejo de Unesko

Kio: UEA traduku la gvidliniojn pri terminologiaj politikoj por publikigo en la retejo de Unesko (laŭ la unua sugesto de Infoterm).

DIFINOJ

Kadre de ĉi-tiu dokumento validas sekvaj difinoj:

1

Internacia Organizaĵo por Normigado

ISO

tutmonda normiga organizaĵo kiu publikigas *normigajn produktojn*

Rimarko 1: ISO ne estas la sola tutmonda normiga organizaĵo.

Rimarko 2: La Centra sekretario de ISO troviĝas en Ĝenevo, Svislando.

2

teknika komitato

komitato

TC

kunigo de spertuloj, kiuj respondecas pri la enhavo de *normigaj produktoj* en sia fako

Rimarko : Grandaj teknikaj komitatoj subdividiĝas en *teknikaj subkomitatoj*.

2.1

teknika subkomitato

subkomitato

SC

ero de *teknika komitato*, kiu specialiĝas pri parto de la fako de teknika komitato

Rimarko: Plejofte teknikaj subkomitatoj povas ĝui grandan sendependecon, kvazaŭ ili estus sendependaj unuoj.

2.1.1

laborgrupo

WG

eta grupo de spertuloj, kiuj interesiĝas pri iu temo ene de fako kaj verkas *normigajn produktojn*

Rimarko: Ĝenerale, laborgrupo apartenas al *subteknika komitato* aŭ rekte al *teknika komitato*.

3

normiga produkto

materia aŭ nemateria objekto, kiu estas rezulto de la laboro de normiga organizaĵo

Rimarko: Normoj, teknikaj specifaĵoj, publikaj specifaĵoj, teknikaj raportoj kaj datumbankoj estas ekzemploj de normigaj produktoj.

4

Internacia informejo pri terminologio

Infoterm

organizaĵo en kiu membras naciaj, regionaj kaj internaciaj organizaĵoj, retoj kaj ankaŭ specialiĝintaj publikaj, duone publikaj aŭ aliaj senprofitaj institucioj agantaj pri terminologio

Rimarko 1: La sidejo de Infoterm troviĝas en Vieno, Aŭstrio.

Rimarko 2: Infoterm, fondita en 1971 dank' al kontrakto inter Unesko kaj Aŭstria Normiga Instituto, plejparte kreiĝis surbaze de la verko de la interlingvisto kaj esperantologo Eugen Wüster.